

Antologio XXXVII

Giorgio Silfer

Kooperativo de Literatura Foiro, Esperanta Civito

Finvenkismo kaj centralismo, aŭ raŭmismo kaj federismo? (2001)

Intervjuo en: *Ondo de Esperanto*

Enkonduko:

En la 'tradicia' Eo-movado kutime validas la kredo pri la „fina venko“ de Eo, tio signifas la ideon, ke iam ĉiuj parolos Eon kiel duan lingvon kaj ke Eo iam estos adoptita de la internaciaj organizaĵoj kaj registaroj kaj enkondukita en la lernejojn. Precipe Universala Esperanto-Asocio (UEA) apogas tiun ideon kaj laboras en la direkto de la efektivigo de respektiva strategio, lobiante en decidaj cel-organismoj de la internaciaj registaroj kaj neregistaraj organizaĵoj, unuavice en Unuiĝinta Naciaro (UN) kaj Eŭropa Unio (EU), uzantaj ĉefe la anglan lingvon iusence „malamikan“ al iuj Eo-reprezentantoj.

Al la „finvenkismo“ aŭ „praelismo“, kiel ĝi estas esprimita ekzemple en la t.n. Manifesto de Prago (1996), kelkaj Eo-intelektuloj kontraŭstarigis la t.n. „raŭmismom“ kaj la „civitismon“, kiu servas kiel bazo de la kritiko de la celoj de la „centrismo“ Eo-movado kaj kiu estas idearo fontinta el la t.n. 'Manifesto de Raŭmo' de la jaro 1980 (vd. ankaŭ parton XXXIV de ĉi tiu Antologio). La subskribintoj de tiu manifesto kredas, ke „la oficialigo de Eo estas nek verŝajna nek esenca dum la 80aj jaroj“ kaj „oni havu alternativajn celojn“. Krom tio ili opinias, ke „la faligo de la angla lingvo estas nek tasko nek zorgo de la e-istoj“. Sekve la raŭmistoj „celas disvastigi Eon por pli kaj pli, iom post iom realigi ĝiajn pozitivajn valorojn“ kiel: „propedeŭtiko por lingvoinstruado“, „kontaktoj inter ordinaraj homoj“, „kontaktoj sendiskriminaciaj“, „novtipa internacia kulturo“. Dum la finvenkismo komprenas sin do pli *por*-esperanta, raŭmismo difinas sin pli kiel *per*-esperantan strategion.

Konklude la raŭmistoj „kredas ke la unua jarcento de Eo pruvis la taŭgecon de la lingvo por esprimi *ĉion*; meze de la 80-aj jaroj, komence de la dua jarcento, ni devos ekmontri al la mondo ke ni kapablas ankaŭ diri *ion* - ion kulture originalan kaj internacie valoran“.

La raŭmismo estas precipe praktikata de la opinimovado ĉirkaŭ Kooperativo de Literatura Foiro, kie raŭmismo estis multe diskutata kaj evoluigata. El la raŭmismo fontis la t.n. Pakto por la Esperanta Civito en 1998. Aliaj gravaj dokumentoj por kompreni raŭmismom estas: la kulturpolitikaj raportoj de LF-koop, la studmaterialo de la simpozio apud Varsovio 1984, la Konkludoj de Segedo 1988 k.a.

Unu el la ĉefaj protagonistoj de la raŭmismo, Esperanta Civito ktp. nomiĝas Giorgio Silfer (*1949), pseŭdonimo de Valerio Ari. En la periodaĵo *La Ondo de Esperanto*, n-ro 7/ 2001, Silfer respondis al kelkaj demandoj pri la problemoj de finvenkismo kaj centralismo kompare kun raŭmismo kaj federismo. Li estas konvinkita, ke nur „federisma“ strategio laŭ la modelo de la Esperanta Civito ankoraŭ povos savi la Eo-movadon de la risko regresi, perej kaj fine malaperi. La Esperanta Civito estas detale prezentita kaj prikomentita aliloke en ĉi tiu Enciklopedio.

Originala teksto (en Esperanto):

La Ondo de Esperanto (LOdE): La redakcia artikolo en *LOdE* 2000/12, pri eventuala reformo de la povostrukturo en UEA (precipe de la Komitato), vekis interesajn komentariojn. Unu el ili estas mallonga eseo de Giorgio Silfer „Federalismo aŭ krizo: Kolonjo 1933 pezas ĝis nun”. (*Heroldo de Esperanto* 2001/1). Ĉu d-ro Silfer bonvolas resumi siajn tezojn?

Giorgio Silfer (GS): Estas oportune premisi, ke mia interesiĝo pri UEA estas esence historiografia. La asocio fondita de Hodler en Ĝenevo (1908) konsistis nur el individuaj membroj. En 1933 Ĝenevo interkonsentis kun Parizo (centralo de la landaj societoj) pri kunfandiĝo. Laŭ tiu interkonsento UEA havu kaj individuajn kaj asociajn (nuntempe oni diras: aligitajn) membrojn. La ĉefa instanco estu elektata de la reprezentantoj de la landaj societoj (A-komitatoj), plus malgranda kvoto elektita de la delegita reto (B-komitatoj). Ĉi tiu strukturo daŭras jam preskaŭ 70 jarojn, kun unusola modifo: ekde la 1980aj la menciitan kvoton elektas ne la delegita reto, sed la tuta individua membraro. En mia mallonga eseo mi esprimis miron, ĉar la svisaj gvidantoj de UEA en 1933 ne klopodis enkonduki pli federan strukturon, sed akceptis plenan centralismon. Kio interalie kondukis, en Stokholmo 1934, al la elimino de tiuj svisoj, unuavice Edmond Privat, eliranta prezidanto. Mi klarigis tion per la fakto ke la organiza modelo de „armeo konkeronta la mondon” pli kongruas kun la ideo de „fina venko”, dum la federismo pli kongruas kun raŭmismo.

LOdE: Bonvolu klarigi la diferencon inter la du organizaj konceptoj.

GS: En federa organizo mankas la „tegmentismo”: la centro estas konsiderata ne kiel gvida, sed kiel subsidua por siaj federitoj. Tio ĝenerale influas la labormetodon: ne plu laŭ vertikala akso, sed prefere laŭ horizontala. Kaj tio influas la reprezentosistemon: la Komitato havus du branĉojn — en unu (pariteta) la landaj asocioj estus ĉiuj reprezentataj po unu aŭ du komitatanoj; en alia (proporcia) la individua membraro rekte elektus siajn komitatanojn, proporcie al la kvanto da IM en la unuopaj landoj. Tiu ĉi estas precize la sistemo antaŭvidita por la naskiĝonta Esperanta Civito: ĝi plej garantias kaj kolektivojn kaj individuojn.

LOdE: Vi aludis al la Civito, kies konstitucio estas promulgota en Sabloneto (Italio), la 2an de junio 2001. Kiel funkcios ĝia reprezenta mekanismo?

GS: Ni vidu la jenan skemon. La Parlamento havas du branĉojn: Forumo kaj Senato. La paktintaj establoj nomumas unuope la proprajn delegitojn en la Forumo, kie ili havas po unu voĉo. La individuaj civitanoj elektas, ĉiun kvinan jaron, per ĝenerala kaj sekreta baloto la membrojn de la Senato (entute 19): la ĉefkandidato de la gajninta listo fariĝos la Konsulo (la dua kandidato de la listo fariĝos vickonsulo). La Konsulo prezidas ambaŭ branĉojn de la Parlamento, sed ankaŭ plenumas la ekzekutivan povon, aplikante la parlamentajn decidojn pere de „registaro” nomata Kapitulo. La decidoj de la Forumo devontigas la establojn, sed ne la individuojn (krom se la establoj konformigas siajn statutojn), dum la decidoj de la Senato devontigas la individuojn.

LOdE: La ĝenerala direktoro de UEA, Osmo Buller, deklaris ke la Esperanta Civito povos peti aliĝon al UEA kiel faka asocio...

GS: La Civito ne estos faka asocio, sed konsorcio de multaj establoj celanta esti subjekto de internacia juro. Eventuale ĝi petos aliĝon tie, kie kunsidas aliaj subjektoj de internacia juro. Aliflanke, ĉiuj Esperanto-establoj (supernaciaj, landskalaj, lokaj, fakaj, ktp.) principe rajtas aliĝi al la Pakto, kaj sekve iliaj membroj (aŭ abonantoj) rajtas peti la civitanecon.

LOdE: Ĉu la aliĝo al la Pakto estas multekosta?

GS: La aliĝo estas finance senkosta. Ĝi tamen implicas moralan elekton: la memkonscio pri sia Esperanta identeco, do senti sin apartenanta al senŝtata diaspora lingva grupo, konforme al la art. 1, par. 5, de la Universala Deklaracio de la Lingvaj Rajtoj (Barcelono, 1996).

LOdE: Ĉu la Esperanta Civito ne riskas esti (strukture federisma) duoblaĵo de UEA?

GS: Tute ne. UEA estas internacia neregistara organizo kiu strebas disvastigi lingvon kaj defendi lingvajn rajtojn (kvankam ĝi ne defendas la cititan Deklaracion de Barcelono: tion faras nur la Pakto, ĉar Esperanta PEN-Centro aliĝis al la Pakto kaj mem iniciatis la Deklaracion, kune kun la tuta PEN-Klubo Internacia kaj amaso da aliaj lingvoinstitucioj, sen UEA). La Civito estos subjekto de internacia juro strebanta defendi la rajtojn de siaj civitanoj. Laŭ la projekto de Karolovaro, la Civito ne strebos havi internacian libroservon aŭ universalan kongreson: ĝi strebos starigi alispecajn kulturajn, socialajn kaj administrajn servojn por siaj civitanoj. Somerumejo por Esperanto-infanoj aŭ ripozdomo por maljunaj Esperanto-lingvanoj, ekzemple, estus servoj pli kongruaj al la celoj de la Civito ol al tiuj de UEA. Kaj ambaŭ realaĵoj povos kunekzisti. Same povos kunekzisti la Civito kaj SAT: verdire ili estas inter si pli similaj, ĉar ambaŭ estas/os PERlingvaj pli ol PORlingvaj realaĵoj — simple la laborista Esperanto-movado praktikas la klasbatalon (almenaŭ teorie), dum la Civito ne naskiĝos sur klasbatala fundamento.

LOdE: Ĉu vi ne antaŭvidas ke ankaŭ UEA iam povos havi federisman strukturon?

GS: Teorie tio eblas, sed ekzistas tro multaj obstakloj. Unuavice, la tempoj: reformi (kaj eĉ radikale!) la statuton okupus plurajn jarojn. Due, la internaj ekvilibroj estas tro malstabilaj: UEA ne havas estraron kun tre fortaj personecoj (la lasta estis Humphrey Tonkin, estrarano ĝis 1989); en la 1990aj jaroj iom post iom la fakaj asocioj levis la kapon, kompare kun la landaj asocioj — ekde 1994 kun estrarano pri faka agado, ekde 1998 kun la t.n. strategia forumo... nun ili ŝajnas ree sinki, laŭ la ĝenerala membrokrizo. La landaj asocioj mem estas kelkdeko, sed nur kelkaj el ili (ĉiuj en Eŭropo, escepte de Japanio kaj Brazilo) sume kovras pli ol du trionojn de la aligita membraro: ĉu ili konsentus egali (eĉ pli ol nun) al nombre sensignifaj partneroj? Trie, ĉiu reformo kuntrenus pli-malpli drastajn ŝanĝojn ĉe la personaro: ĉu sen rezistoj? Kiel ajn, ekzistas limdato, eĉ morta linio, kiel dirus la angloj: kiam la individua membraro konsistos plejparte el okcidenteŭropaj emeritoj, UEA ne estos plu memreformebla. Detalan statistikon mi ne konas, sed mi perceptas ke la tempo laboras kontraŭ ia sukcesa perestrojko de tiu asocio.

LODE: Kio okazas tiam? Ĉu tiaj asocioj mortas?

GS: Ne nepre, kaj ne tuj. Simple ili ne havas plu internan forton por naĝi en la makrosocio, sed nur por flosi. Eventualaj ŝanĝoj dependos nur de eksteraj makrosociaj novaĵoj, ne de internaj mikrosociaj premoj. Por Esperantio ĝenerale la enkonduko de interreto povus esti unu el tiuj eksteraj makrosociaj novaĵoj. Interalie la Esperanta Civito estis teorie pensebla, sed praktike nerealigebla antaŭ la disvastiĝo de interreto.

El: *La Ondo de Esperanto*, n-ro 2/2003:

LODE: Ĉu via espero pri la rolo de la Esperanta Civito bazas sin jam sur konkretaj faktoj, aŭ estas nur la rezulto de ideologia elekto?

GS: Ideologia elekto tamen povas esti tre konkreta fakto, se ĝi rezultas el konkreta analizo!

En 2002 kreskis la distanco inter Esperantujo kiel asociaro kun komuna celo kaj Esperantio kiel socio kun komuna destino.

La unua montras ne kaŝeblajn simptomojn de regreso. Ne nur pro la falo de la membrokvanto: cento aŭ milo da perditaj kotizoj ne signifas aŭtomate malkreskon, kiel sama kvanto da pliaj pagoj ne sufiĉus por paroli pri progreso. Temus ambaŭkaze pri guto en la monda oceano. La vera regreso situas en la velko de la tradiciaj strukturoj, kiuj ne plu respondas al la realo de la nuna epoko.

La dua realaĵo montras signojn de febla maturiĝo. La esperantistoj estas ĝenerale pli malriĉaj, en la unua kiel en la tria mondo (la dua eĉ perdiĝis inter ili) — pro la krizoj ekster Eŭropo (ekzemple Argentino), pro la kreskanta senlaboreco ĉie, pro la pensioj devige pli malaltaj ol la salajroj. Se en tia kunteksto (al kiu aldoniĝas militaj riskoj) firmiĝus la sentoj de transnacia solidareco, mi ĝojus paroli pri kvalita kresko de la Esperanto-socio.

Raŭmismo, kaj la Esperanta Civito kiel ĝia konsekvenca apliko, kontribuas en tiu direkto: ĉar demokratio estas esenca en la kvalita kresko de Esperantio.

Mi klare perceptas ke la Esperanto-parolantoj havas pli kaj pli da bezonoj kiel socio, kaj ke la asociaro ne povos kontentigi ilin. Se la Civito kapablos — bone. Ĉar se Ĝi ne kapablos, kiu kapablos?

Antologio XXXVIII

Claude Piron

Psikologo, psikanalisto kaj psikoterapiisto

La t.n. fiasko de Esperanto (2004)

Prelego en Vieno

Enkonduko:

La svisa psikologo Claude Piron (*1931) klarigas al si la fenomenon de la adopto de Eo far individuoj kiel speco de enamiĝo al iu formo de arketipo. Eo estas simbolo de tiu arketipo. Multajn psikologiajn konsiderojn kaj argumentojn pri Eo Piron traktis en siaj prelegoj prezentitaj en ĉi tiu Antologio (vd. partojn XXXIV kaj XXXV).

La distingo inter sukceso kaj fiasko de io kiel Eo signifas streĉiĝon inter io subjektiva kaj objektiva. Dum por la plimulto de la neesperantistoj Eo fiaskis, multaj e-itoj mem konsideras ĝin sukcesinta, precipe kiam temas pri la privata uzado de tiu lingvo. Por solvi tiun konflikton, kiu havas gravan konsekvencon por la psika stato de la e-tistoj, necesus laŭ Piron ŝanĝi la formulon kaj diri „Eo ankoraŭ ne sukcesis” anstataŭ kredi la ĝenerale akceptitan diraĵon „Eo fiaskis”. La ĝeneva psikologo memorigas, ke en la historio la avangardaj ideoj ĉiam daŭris longe por esti akceptitaj kaj enkondukitaj: la abolo de la sklaveco, la adopto de la arabaj ciferoj aŭ de la metra sistemo. Ankaŭ Eo devas elteni multajn obstaklojn kaj rezistojn, kiuj estas ŝulditaj al la konservativa mentaleco de la homoj. La sekva, tria prelego de la ‘ĝisosta’ e-isto Claude Piron en ĉi tiu Antologio estis prezentita en Vieno la 4-an de oktobro 2004.

Originala teksto (en Esperanto):

Por la plimulto el niaj samtempuloj, kiuj havas ideon pri tio, kio estas Esperanto, estas evidente, ke ĝi malsukcesis. Mi ne samopinias. Kion mi celas, dirante tion? Estas evidente, ke L.L. Zamenhof ne sukcesis. Li celis ŝanĝi la interpopolajn rilatojn direkte al pli da paco, malpli da konfliktoj. Li celis, ke *disfalu la obstinaj baroj*, kaj ke *la granda sonĝo de l' homaro por eterna ben' efektiviĝu*. Tio ne okazis. Li imagis, ke la homaro rapide alprenos lian lingvon, Tio ne okazis. Li do malsukcesis.

Se L.L. Zamenhof ne sukcesis, ĉu eble sukcesis la esperantistoj? Tio estas absurda demando, ĉar „*la esperantistoj*” ne ekzistas. Ekzistas homoj, kiuj lernis Esperanton, homoj, kiuj amas Esperanton, homoj, por kiuj Esperanto estas agrabla hobbio, homoj, por kiuj ĝi estas grava idealo rilata al justeco, ekzistas raŭmistoj kaj neraŭmistoj. Esperantistoj estas tiel diversaj, ke oni ne povas valide diri pri ili ion ĝeneralan. Eĉ iliaj celoj estas tre malsamaj. Ĉu do ni diru, ke Esperanto sukcesis por tiuj, kies celo estis A, kaj ankaŭ por tiuj, kies celo estis B, kaj malsukcesis por tiuj, kies celo estis C? Se por iuj, la celo estis krei originalan, internacian kulturon ne ligitan al iu nacio, oni povas diri, ke Esperanto sukcesis. Se kompari ĝin kun aliaj kulturoj en la unua jarcento de ties vivo, oni eĉ povas diri, ke ĝi mirinde sukcesis. Sed por tiuj, kiuj celis, ke Esperanto estu la normale uzata lingvo en diplomaciaj rilatoj, estas klare, ke la celo ne estis atingita, kaj eĉ ne montras signojn, ke ĝi estos atingita en pensebla estonta tempo.

Honeste, mi ne scias, kion mi volas diri, kiam mi asertas, ke Esperanto ne malsukcesis. Eble ke ĝi sukcesis ekzisti. Esti. Kaj resti.

Ŝajnas al mi, ke ekzistas en la homaro iu nekonscia, kolektiva, malklara aspiro al io, io nedifinebla, sennoma, ĉar tro malpreciza, sed io bona por la tuta homaro. Kaj tiu aspiro, kvankam nebula, estas tre forta, ege potenca, kapabla movi gigantajn individuajn energiojn, vekti rimarkindajn sindediĉojn ne facile pravigeblajn racie. En kelkaj individuoj tiu aspiro al iu bono senkontura kaj sennoma kristaliĝis en la koncepto Esperanto, tiel ke ili investas grandan parton de sia memo, de sia *libido*, dirus Freud, en la kampon, kiun la vorto Esperanto aludas. La koncepto „Esperanto” tiel alprenas la altirforton, kiun Carl Gustav Jung atribuas al tiuj kernoj de psika energio, tiuj nebulozoj psikaj, kiujn li nomas *arketipoj*. Ĝi estas la konkretiĝo, do la pensebla formo de io nepensebla, de io, kio staras trans nomeblo, sed kio altiras psikojn kun forto senfine pli granda ol la forto, per kiu la plej giganta elektromagneto altiras feron.

Mia propra historio donas probablecon al tiu hipotezo. Se mi provas rememori, kio okazis ĉe la renkonto kun Esperanto, mi retrovas impreson, kiu konfirmas la hipotezon, ke ĝi estas io, sur kio projekciigatas nekonscia arketipa energio. Tio estas la impreso de *rekono*. Kiam mi unufoje renkontis Esperanton, mi havis tre klaran impreson, ke „jen ĝi”; „jen tio, kion mi atendis, ne sciante, ke mi ion atendas; „jen tio, kion mi konis antaŭe kaj forgesis, sed kio estas ege grava, kio estas, iel, parto de mi, parto ĝis nun ignorita, sed nun trovata kun korŝveliga ĝojo.” Kiel mi multajn jarojn poste malkovris dum mia psikfaka trejniĝo, tiu sento estas tipa pri la renkonto kun arketipo.

La impreso de sukceso do simple rezultus el la kontakto kun iu mistera interna psika nukleo, kun io, kiu simbolas ĝin aŭ esprimas ĝin en la realo de la socia vivo. La aspiro trovis sian konkretiĝon, oni povus diri: al la fora nebula celo ligiĝis proksima, preciza rimedo, kaj vekis la senton de senpeziĝo, kiun oni spertas, kiam oni povas diri al si: „Mi ne plu bezonas serĉi, jen mi trovis.”

Sed mi ne venis ĉi tien por paroli pri mi. Mi citas mian kazon, ĉar mi konas ĝin pli precize ol aliajn, sed tiu sperto tute ne estas unika, kvankam la detaloj ege diferencas de persono al persono. Foje mi aŭdis Humphrey Tonkin diri: „*Eĉ se mi scius, ke neniu parolas Esperanton, ke neniu uzas ĝin, kiam mi eksciis pri ĝi, mi ne povus ne eklerni ĝin.*” Jen do alia kazo, en kiu la altirforto de tiu stranga fenomeno estis pli forta ol ĉiuj raciaj argumentoj kaj konsideroj.

Kaj da similaj kazoj mi renkontis multe. Pri tiuj oni rajtas diri, ke Esperanto sukcesis. Ĝi sukcesis tuŝi iliajn korojn tiel forte, ke ili komencis dediĉi al ĝi kvantojn da energio, kiuj, rigardataj de ekstere, ŝajnas absurde senproportciaj kun la ŝancoj atingi la celon. Ĉar en la plimulto de la socio, la kontakto ne okazis inter la nekonscia arketipo kaj la konkretaĵo Esperanto, la plej multaj homoj absolute ne povas kompreni tiom da dediĉo al lingvo nek praktike vaste uzebla, nek ligita al multjarcenta kulturo. Kaj la esperantistoj sentas sin nekomprenataj, nekapablaj komuniki sian sperton. Ĝi ja estas sperto komparebla kun enamiĝo. Kaj enamiĝo ne estas klarigebla racie.

Bedaŭrinde, ni estas influataj de la ĝenerala opinio. Ĉar esperantistoj konstante aŭdas, ke Esperanto malsukcesis, kaj la argumentoj de tiuj, kiuj tion proklamas, aperas validaj, ili emas akcepti tiun opinion. Ili tiel suferas disdubiĝon, kiu povas esti doloriga. En ili ja vivas la sento, ke Esperanto, por ili, sukcesis, ĉar ĝi sukcesis koincidigi la arketipan aspiron kun plene kontentiga realaĵo. Sed tiun senton ili ne povas kunordigi kun la evidenta fakto, ke Esperanto malsukcesis, kiel abunde montras la ĉirkaŭa vivo. Estas do en ili streĉiĝo inter io subjektiva kaj io objektiva. Ne ĉiuj trovas, kion fari, por solvi la konflikton.

Helpas tiurilate analizi, kion diras tiuj, kiuj ne dubas pri la fiasko. Se ni tion faros, ni unue konstatos, ke tiu konvinko estas absoluta. Homo, kiu diras: „Esperanto evidente fiaskis”, estas certa, ke tiu malsukceso estas tuta kaj definitiva. Fakte, ĝi egalas liamense al „Esperanto estas nulo”. „Ĝi ekzistis kiel projekto, sed la projekto disfalis”. Ĝi do ne plu ekzistas.

Interese, tiu impresio, ke la nuna ŝajna malsukceso estas io absoluta, tuta, definitiva fakte povas aperi nur, se oni rezonas kiel infano malpli ol sesjara. Ĉiu el ni estas mense plenkreska nur pri kelkaj kampoj de la vivo. En multaj aliaj kampoj ni mense plu funkcias kiel kvar- aŭ kvinjaruloj. Kaj la cerba funkciado tiuaĝa karakteriziĝas per tio, ke la menso ne povas teni kune pli ol du konceptojn, kiuj ĉiam estas *simetriaj*, *kontraŭaj* kaj *ekstremaj*: granda / malgranda, forta / malforta, ĉio / nenio. Plenkreskuloj eĉ tre inteligentaj kaj mense tute kompetentaj en sia profesio aŭ en la ĉiutaga vivo, tamen plu funkcias laŭ la pensa sistemo de kvarjarulo en multaj kampoj, kiel politiko, juĝo pri aliuloj, religio, la bildo pri si mem, ktp. Nu, Esperanto estas unu el la kampoj, en kiuj estas facile evidenti tiun prapensan funkciadon.

Ekzemple multaj simple ne kapablas imagi, ke la nuna Esperanto diferencas de la lingvo, kia ĝi prezentiĝis en 1887. Tiaj homoj diras: „Vivanta lingvo evoluas, Esperanto ne povas evolui, Esperanto do ne estas vivanta lingvo, tial ĝi fiaskis.” Rimarku, ke ne temas nur pri eraro pro malĝusta informiĝo; ĉe tiaj homoj, temas fakte pri nekapablo *imagi*, ke lingvo proponita de unu homo povas evolui. Tiu nekapablo rilatas al la prapensa funkciado, al tiu mensa funkciado tipa pri infano malpli ol sesjara, la du-termina pensmaniero: *ĉu ĉio*, *ĉu nenio*. Ekzistas Lingvo Internacia de D-ro Esperanto de 1887, kaj tio estas ĉio, krom ĝi ekzistas nenio tiukampe. Tiuj homoj ne aplikas al Esperanto la saman rigardon kiel al ĉiuj aliaj realaĵoj. Urboj modifiĝas, stiloj ŝanĝiĝas, muzikoj evoluas, vesta modo tre diferencas de jardeko al jardeko, sed Esperanto restas definitive fiksita, kia ĝi estis en 1887.

Malpli ofte renkontata hodiaŭ, sed tamen ankoraŭ multfoje trovebla en gazetaj artikoloj kaj diskutoj pri la temo, estas la ideo, ke Esperanto celis anstataŭi la naciajn lingvojn. Nu, homoj plu uzas naciajn lingvojn, ĝi do fiaskis.

Aŭ ni konsideru la manieron kompreni sukceson. Por multaj homoj, Esperanto ne sukcesis, ĉar ĝi ne konkeris la tutan mondon. Por ili, sukceso neprigus, ke Esperanton uzu ĉiuj ŝtatoj, ke oni ĝin instruu en ĉiuj lernejoj de la mondo, aŭ almenaŭ, ke oni povu iri ien ajn kaj alparoli iun ajn surtrouare en Esperanto kaj esti komprenata. Sed tiun manieron koncepti sukceson ili ne aplikas en aliaj kampoj. Neniam ili pensus: „Honda-veturiloj malsukcesis, ĉar multegaj homoj uzas ne Hondan, sed Toyotan, Mercedeson, Citroenon, Ford aŭ ion alian.” Ree ni konstatas, ke Esperanto estas izolita de la cetera vivo. Oni aplikas al ĝia sukceso kriteriojn, kiujn oni ne aplikas en la aliaj kampoj. Interese, ĉu ne?

Aldoniĝas al ĉio ĉi nekapablo rigardi la aferon laŭ historia perspektivo. La rezulto estas ignoro de la koncepto „*ankoraŭ ne*”, „*ne jam*”, „*ĝis nun ne*”. Refoje ni vidas, ke estas diferenco inter Esperanto kaj la aliaj kampoj de la vivo. Estas multaj terenoj en la socia vivo, sur kiuj homoj luktas por plibonigi la mondon. Ekzemple pri egaleco inter viroj kaj virinoj, inter nigrahaŭtuloj kaj blankhaŭtuloj, inter sociaj tavoloj rilate al studŝancoj, pri indiĝenaj rajtoj, pri komerca justeco inter nordo kaj sudo, kaj multaj aliaj. Ĉu homoj, kiuj priparolas tiujn temojn, pensas aŭ sentas: „la lukto fiaskis”? Ne. Ili pensas: „*Ni ankoraŭ ne sukcesis. Restas multo por fari.*” En 1700 jam estis homoj, kiuj luktis por elimini sklavecon. Sed en 1864 sklaveco ankoraŭ ekzistis. Ĉu en 1850 estus ĝuste diri: „la lukto kontraŭ sklaveco malsukcesis”? Ne. Historio instruas al ni, ke la sola ĝusta frazo estus: „*En 1850 la lukto kontraŭ sklaveco ankoraŭ ne sukcesis*“. Sed neniam vi aŭdas homon certan pri la esperanta fiasko diri: „*Esperanto ankoraŭ ne sukcesis*”. Kvazaŭ ĝi disponis nur limigitan nombron da jaroj por konkeri la mondon, kaj ne atingis tiun celon antaŭ la antaŭfiksita limdato. Sed kial limdato? De kie limdato?

La ideo, ke Esperanto estas fenomeno, kiu progresas laŭ la ritmoj de historio, alivorte ege malrapide, ne venas en la kapon de la kritikantoj. Sed la t.n. arabaj ciferoj estis proponitaj en Eŭropo unue en 1202, en *Liber Abaci*, sed nur en la 16-a jarcento ili ĝeneraliĝis por anstataŭi la romajn. La romaj estas tiel komplikaj, ke dum ili regis, nur matematikistoj povis fari multobligon aŭ dividon. Kiam la arabaj ciferoj disvastiĝis, eĉ kamparanoj, eĉ infanoj, eĉ metiistoj kapablis fari dividajn kaj multobligajn, kaj povis rapide adicii. La arabaj ciferoj estas pli koheraj, pli regulaj, kaj sekve pli praktikaj kaj demokratiaj. La rilato inter ili kaj la romaj ciferoj estas tute komparebla al la rilato inter Esperanto unuflanke, la angla aliflanke. Sed la rezisto al tiuj novaj ciferoj estis tre vigla. La universitatoj kaj la Eklezio ilin rifuzis kaj ili eĉ estis malpermesitaj kelkloke, ekzemple en Florenco. Ĉu cent jarojn post ilia apero en Eŭropo estus ĝuste diri: „La arabaj ciferoj fiaskis”, ĉar nur kelkaj izoluloj kapablis ilin uzi?

Alia komparo povas esti farita kun la metra sistemo. Ĝi estis proponita de Gilbert Mouton, pastro en Liono (Francio), en 1647. Cent dudek jarojn poste, en 1767, ĝi estis uzata nur eksperimente de kelkaj personoj. Ĉu oni sekve povas diri, ke la metra sistemo fiaskis? Tute ne. Oni devus diri: 120 jarojn post sia apero, la metra sistemo *ankoraŭ ne* sukcesis. Cent dudek jarojn post la apero de Esperanto, oni devus fari la hipotezon, ke eble Esperanto *ankoraŭ ne* sukcesis.

Tiu historia perspektivo povas helpi seniĝi je la streĉiĝo inter subjektiva sento kaj objektiva konstato, pri kiu mi antaŭe parolis. Oni povas elekti la starpunkton: „Mi apartenas al avangardo”. Efektive, la homoj, kiuj luktis por liberigi la mondon je sklaveco, aŭ por oficialigi la arabajn ciferojn, tiuj homoj pravis eĉ dum la tuta daŭro, dum kiu ilia agado restis senrezulta, kaj ili estis moke rigardataj. Ni povas vidi nin en la sama situacio. Eble ni eraras, sed la hipotezo, ke eble ni estas pioniroj, ne estas malpli probabla ol la kontraŭa, se oni komparas kun similaj agadoj en historia perspektivo. Alia punkto. Por taŭge mezuri, ĉu io sukcesis aŭ

malsukcesis, oni devas konsideri la gravecon de la obstakloj, kiuj malhelpas glatan vojon al sukceso. Kial la arabaj ciferoj bezonis tiel longan daŭron por sukcesi en Eŭropo? Ĉar la forto de inertecon, la bezono alkroĉiĝi al ĉio konata kaj paralele timi ĉion novan, ĉion revolucion, estas ege potencaj. Kaj la rezisto kontraŭ novaĵoj ekspluatas ĉiujn rimedojn, eĉ malhonestajn, eĉ blindiĝon. Kiam fotografio estis inventita, dum almenaŭ unu jardeko ĵurnalistoj ironiis pri la homoj, kiuj kredas, ke oni povas fiksi sur paperon bildon ne desegnititan de homo, sed iel teknike ricevitan. La intelekta elito rifuzis vidi ion, kio estas evidenta, se oni honeste informiĝas. Tio memorigas al mi frazon prononcitan de hinda amiko, kiu diris: „*Oni povas vidi en la ekstera mondo nur tion, kion oni antaŭe vidis en la interna mondo.*” Por multegaj homoj Esperanto ne ekzistas, ĉar ili dekomence ne kapablas imagi, ke lingvo ellaborita de unu homo povas evolui, fariĝi lingvo vivanta kaj normale funkcii kiel lingvoj ricevitaĵoj de longa serio da prapatroj.

Alia punkto menciinda estas, ke entrepreno povas sukcesi en tute alia maniero ol imagis la iniciatinto. Kiam Thomas Edison inventis sonkonservan sistemon, li absolute ne pensis pri muziko. Li ne imagis, ke ĝi povos esti ege uzota afero. Li diris: „Ho, eble tio povos utili por registri la lastajn vortojn de iu mortanta“. Lia invento fariĝis ege sukcesa, sed en aliaj kampoj kaj per aliaj formoj ol li imagis. Mi diras tion por emfazi, ke eble la intencoj de L.L. Zamenhof ne estis realigitaj, sed tio ne signifas, ke Esperanto fiaskis. Ĝi povis sukcesi en alia maniero.

Sed mi revenu al la obstakloj. La realo ĉiam estas ege kompleksa, kaj nia menso ne ŝatas kompleksecon, ĉar estas multe pli lacige pensi pri kompleksaj aferoj ol pri simplaj. Homoj do havas naturan tendencon simpligi la problemojn. Diru: „*Jam pli ol cent jaroj pasis ekde kiam Esperanto estis proponita, kaj preskaŭ neniu scias ĝin, ĝi do malsukcesis*” estas subtaksi la obstaklojn, kiujn Esperanto devis superi simple por vivteni sin.

Esperanto trabatis al si longan vojon tiel plenan je obstakloj, ke ĉiutape oni povus diri: ĉi-foje ĝi nepre mortos. Tre ofte la lingvo frontis al situacio, en kiu la plej probabla sekvo estis malapero, disfalo. Kaj ĉiuforte, kio efektive okazis, tio estis la plej malprobabla evoluo. Se io kapablas rezisti al ĉiuj batoj de aro da malfavoraj cirkonstancoj, kiuj evidente estas multe pli fortaj ol ĝi, tio signifas, ke ĝi havas kaŝitan forton, kiun individuoj ne povas koncepti. Tiu kaŝita forto, miaopinie, estas la arketipo, pri kiu mi komence parolis, kaj kiun ĝi konkretigas. Esperanto estas simbolo de tiu arketipo. Kartezianoj kaj sciencistoj – kaj ankaŭ PIV – emas vidi en simbolo simplan bildan esprimon de io alia, sed fakte simbolo estas multe pli ol simpla traduko de io abstrakta en konkretan bildon, simbolo tuŝas korojn kaj povas movi nin, irigi nin sur vojojn, pri kiuj ni ne pensis antaŭ la renkonto kun ĝi.

Sed se por iuj Esperanto ludas rolon de pozitiva simbolo, por aliaj ĝi estas simbolo minaca.

Oni malofte ĝuste taksas la amplekson de la ŝoko, kiun kaŭzis al la mensoj la simpla propono uzi interpopolan lingvon intence ellaboritan por servi al interpopolaj rilatoj. La mezuma homo havas bele organizitan bildon pri la mondo. Nia planedo laŭ ĝi estas enloĝata de iu nombro de popoloj, aŭ etnoj, kaj ĉiu havas sian lingvon, kiu difinas ĝin. Ĉar Esperanto estas lingvo sen popolo, sen prapatroj, oni ne scias, kie klasi ĝin. Kaj tio atencas la tutan strukturon de la mondo en la mensoj. Tia atenco estas ege malkomforta. Ĉar estas pene forlasi profunde fiksititan skemon por anstataŭe alpreni novan oni perceptas Esperanton minaco al la mensa trankvilo, kaj oni deklaras ĝin ĉiakoste rezistinda. Kaj ĉi tie intervenas tipa psikologia meĥanismo: io emocia nekonscie glitas al io pensa. La sento pri minaco apartenas al la emocia sfero, sed ĝi

facile kondiĉas opinion, kiu apartenas al la sfero intelekta. Io afekcia, senta facile difinas la manieron, laŭ kiu ni perceptas la realon. La deziro, ke Esperanto ne ekzistu, transiĝas al certeco, ke Esperanto ne ekzistas, alivorte, ke ĝi fiaskis. Por superi tiun obstaklon, necesos longa edukado de la homoj, longa procezo, dum kiu la senbaza timo al io minaca iom post iom formalaperos.

Alia obstaklo estas la timo ekkoni la fremdlandanojn, la alikulturanojn. Esperanto atencas la senton de praveco, aŭ de plipraveco, kiun la plej multaj homoj havas pri si rilate al aliaj popoloj. Ni perfekte scias, ke komunikante oni influas unu la alian, ke malkovrante alian mondon, ni devas realĝustigi niajn ideojn pri la nia. Imagu! Se kristano povas perfekte interkompreniĝi kun islamano, ĉu ne infektos lin la ideoj de ĉi-lasta? Ĝuste tion celis L.L. Zamenhof Ke ĉiu popolo kaj ĉiu religio pli bone konu ĉiun alian, kaj ke tiu reciproka konatiĝo relativigu la sentojn pri ekskluziva praveco de nia popolo aŭ religio. Tio nur povis vekti fortegan reziston. Kaj eĉ la homoj, kiuj ne konis la tiurilatajn ideojn de L.L. Zamenhof, intuciis, ke tio povus esti rezulto de alpreno de komuna lingvo neprapatra.

Eblas citi multajn aliajn psikologiajn obstaklojn. Unu rilatas al la koncepto pri perfekteco. La ideo, ke Esperanto pretendas esti perfekta, estas tre disvastigita. La libro, en kiu Umberto Eco pritraktas Esperanton, titoliĝas: „*La serĉado al la lingvo perfekta*“. En la nekonscia menso, ankaŭ tiu perfekteco de Esperanto estas sentata kiel danĝera. Unuflanke pro ia nekonscia rezonado, kiun eblas resumi jene: homo laŭ difino estas neperfekta, io perfekta estas do nehoma. Kaj aliflanke, ĉar ni identigas nin al nia lingvo. Ankaŭ ĉi-rilate intervenas la infaneca dutermina pensmaniero, la pensmaniero per „ĉu ĉio, ĉu nenio“. Se Esperanto estas perfekta, ĝi estas supera, se ĝi estas supera, mi estas malsupera.

Tiu infaneca pensmaniero ja funkcias iom kiel pesilo. Se vi puŝas malsupren unu el la teleroj, la alia aŭtomate altiĝas. Kiam knabo diras pri alia: „li estas stulta“, tio aŭtomate signifas por li: „mi estas inteligenta“. Tio estas eraro, ĉar ambaŭ povas esti stultaj, sed tiel funkcias la dutermina pensado. Se do Esperanto estas perfekta, ĝi estas supera al nia lingvo kaj al ni. Ĉar ni ne volas rigardi nin malsuperaj, ni neas Esperanton. Ĉiufoje, kiam mi prelegas pri Esperanto, iu en la publiko diras. „Ĉu vere oni povas esprimi ĉion ajn en tiu lingvo?“ Kaj kiam mi diras „Jes, kiel en aliaj lingvoj“, la persono trovas ekzemplon, vorton tipan pri la franca lingvo, kaj diras: „Kiel vi tradukus tion en Esperanto?“ Nu, kion signifas tiu demando? Fakte, ĝi ne estas vera demando de iu scivolema, ĝi estas defio de iu, kiu esperas montri la preleganton venkita, embarasita. Tio estas provo resekurigi sin pensante: „Mi ne estas malsupera, mia lingvo havas vortojn, kiujn li ne povas traduki, mi estas supera.“

Alia, pli grava ŝoko, kiun Esperanto per sia simpla estado kunportas kun si, estas, ke ĝi minacas la hierarkian strukturon de la familioj, kaj per tio de la tuta socio. Mi ne atendas, ke vi kredos min ĉi-rilate, sed tamen tio estas vera. Kial Esperanto renversas la hierarkian strukturon de la familioj, la aŭtoritatan bazon de la socia strukturo? Ĉar ĝi relativigas la aŭtoritaton de la praavoj. Kiam infano komencas paroli, ĝi uzas lingvaĵon, kiu ne konformas kun la oficiala, norma lingvo vorte, gramatike, sintakse. Tiam, en iuj familioj oni korektas ĝin, per frazo kiel: „Ne tiel oni diras, sed tiel ĉi“. En aliaj familioj oni ne korektas, oni simple fidas la infanan naturan emon imiti kaj lasas ties influon laŭgrade elimini la formojn, kiuj ne apartenas al la norma aŭ al la loka lingvo. Sed egale kiel komuniĝas la korekta lingvo, ĝi entenas kaŝitan mesaĝon, kiun oni povas vortigi jene: „*Via logiko, viaj spontanaj inklinoj, via lingva kreemo valoras neniom. Vi parolos kiel ni, ĉar nur nia maniero estas akceptebla.*“ La infano ne konscias tiun mesaĝon, nek la plenkreskuloj, kiuj elsendas ĝin, sed ĝi enpasas en la menson. La ideo, ke logiko, ke natura tendenco, ke lingva kreemo

estas iel malbonaj enradikiĝas. Kaj tio signifas: „*patro, patrino, prapatroj, instruisto pravas nur per tio, ke ili estas patro, patrino, prapatroj, instruisto, ili tute ne havas devon pravigi siajn decidojn. Eĉ se tiuj estas sensencaj, stultaj, mi devas sekvi ilin senkritike. Mi etulo ne rajtas fari, kiel mi nature, spontane faras, eĉ se tio estas pli kohera, pli racia, ol ilia maniero fari.*” Tio estas la fundamento de la hierarkia, aŭtoritata sistemo de nia socio.

Sed Esperanto estas danĝera por tiu mensa strukturo. Oni ja scias, ke ĝi estas, iel, libera lingvo. Homoj ne scias tion precize, nek vere konscie, sed ili scias. Ili implice sentas, ke homo, kiu ellaboras lingvon, ne metos en tiun lingvon ĉiaspecajn arbitrajn detalojn, kiaj abundas en la t.n. naturaj lingvoj. Ĉiuj neanglalingvanoj, kiuj ekstudis la anglan, miris, ke en lingvo, en kiu oni formas adverbos per aldono de *-ly*, ili ne rajtas, ĉe puno de miskompreno aŭ ridindiĝo, esprimi la ideon „mi serioze, severe, diligente kaj pene laboris” per *I hardly worked* (tio signifas: „Mi apenaŭ laboris”). Kaj kiam ili demandas: „Kial tia nekonsekvencaĵo?” La respondo estas: „ĉar estas tiel”. Ne estas alia respondo. Pripensu kelkminute pri tiu respondo, vi ekkonscios, kiel diktatora ĝi estas. Pravas tio, kio venas de la prapatroj, de la malluma fundo de multmiljara historio, ne pravas la nuno, ne pravas logiko, ne pravas la propra juĝo de infano aŭ de tiu, kiu lernas fremdan lingvon. La mesaĝo de la naciaj lingvoj estas: „*Vi konformigu vin, eĉ se tio estas absurda*”. Ĉar Esperanto estas lingvo tute juna, eĉ la homoj, kiuj scias nenion pri ĝi, intuiacias, ke ĝi ne enhavas tiajn absurdaĵojn, ke ĝi estas libera. Enkonduki liberecon en la reguloj, kiuj difinas, kiel oni vivu, tio estas renversi la normalan ordon de la socio, tio estas subfosi la bazojn de aŭtoritato. Tio estas danĝera. Tion oni ne allasu. Jen impona obstaklo, kiun Esperanto devas tratabi.

Aldoniĝas al tio la du-termina pensmaniero de infano kvarjara, laŭ kiu la konceptoj nepre estas kontraŭaj kaj ekstremaj. Oni tiel kontraŭmetas liberecon kaj rigoron unu al la alia. Io estas ĉu rigora, ĉu libera, kaj *libera*, ĉe la ekstremiga emo de tiu pensmaniero, sentiĝas kiel *anarĥia*. Ili ne povas imagi Esperanton kiel lingvon samtempe ege rigoran kaj tamen ege liberan. Tamen Esperanto ĝuste karakteriziĝas per la kunordigo de tiuj du ŝajne kontraŭaj aspektoj. Pri la rigora flanko, pensu pri la deviga akuzativo aŭ la fakto, ke verbo estas transitiva aŭ netransitiva; kaj pri la libera flanko, pensu pri la multaj liberaj manieroj esprimi ideon: vi povas diri *mi helpis lin, mi lin helpis* aŭ *mi helpis al li*; vi povas diri: *mi venis al Vieno per trajno, mi venis Vienon trajne, al Vieno mi trajnis*, ktp. Aliaj lingvoj ne havas tiun vastecon de elekto. En Esperanto libereco kaj rigoro bonege integriĝas. Sed tio ne estas pensebla, se oni aliras la temon laŭ infaneca maniero pensi.

Plia psikologia obstaklo, kuŝanta en la profundo de la nekonscio, denove estas arketipo, alia arketipo ol tiu, kiu allogas al Esperanto. Mi parolis pri tio, ke Esperanto enkarnigas en la ekstera mondo ion internan, kio estas la arketipo pri mondo, al kiu ni ĉiuj aspiras: mondo de paco, de harmonio en la rilatoj, de reciproka respekto, de senfuŝa interkompreniĝo. Tiu arketipo ekzistas en ĉiuj homoj. Sed ankaŭ alia ekzistas en ĉiuj homoj, kaj homo estos altirata al Esperanto, aŭ fortimigita for de ĝi, laŭ tio, kiu el la du arketipoj estas pli forta en la subkonscia psiko. Tiu alia arketipo estas la *roboto*, la *aŭtomato*.

Ĝi devenas de tio, ke nur parte ni faras tion, kion ni konscie volas. Ekzistas multaj fumantoj, kiuj preferus ne fumi, sed simple ne povas ĉesi. Aŭ se citi alian ekzemplon, jen io, kio okazis al mi. Dum eble du jaroj mi ĉiumonate havis kunsidon en loko, kien mi iris aŭtomobile. Ni kunvenis vespere, kaj, kiam mi revenis hejmen, ĉiam estis nokto. Por reveni mi devis veturi sur flanko malgrava strato, de kiu mi devis transiri al larĝa avenuo. Tie estis trafiklumo. Ĉiufoje dum du jaroj, kiam mi atingis tiun lokon, la lumo estis

ruĝa, mi do haltis. Nu, foje, la lumo estis verda. Kaj mi haltis. Kial? Ĉar regis mian konduton la parto de mi, kiu funkcias aŭtomate. Ne mia egoo, ne mia konscio regis la pedalojn, sed la roboto en mi. Pro la ekzisto en ni de tiu psika strukturo okazas ĉiusomere multaj veturilaj akcidentoj en kontinenta Eŭropo, ĉar, ĉe britaj turistoj, la kutimo veturi maldekstraflanke de la vojo malkroĉiĝis de la egoo, de la konscio, kaj enfiksiĝis en ilia psika roboto. Ĉar ĉiu el ni, ek de nia plej frua aĝo, spertas tiajn intervenojn de io aŭtomata en ni, io, kio radikas en kutimoj, refleksoj, kondiĉadoj kaj kio estas ofte pli forta ol nia konscia volo, la travivaĵoj tiukampaj formas en nia nekonscio ian nukleon psikan, ian strukturon, kiu transformiĝas en tiun arketipon de la roboto aŭ aŭtomato.

Kiel ĉiuj arketipoj, tiu emas projekciiĝi. En la sciencfikcia literaturo, tre oftas la temo pri robotoj, kiuj fariĝas pli potencaj ol la homoj, kaj kiuj iel reduktas la homojn al sklavoj. Alia objekto, sur kiun okcidentanoj facile projekcias, aŭ almenaŭ projekciis, tiun arketipon de la roboto, estas la ĉina popolo. Por multaj neazianoj, la ĉinoj estas homoj rigidaj, nekomprenablaj, nepenetreblaj, senemociaj, malvarmaj, kapablaj surtreti la tutan mondon mortige, kun senstreĉa sed ankaŭ senviva vizaĝo, neniam ridantaj, montrantaj nur enigman rideton, kiu aŭguras nenion bonan. Kiam vi vivas inter ĉinoj, vi tre rapide konstatas, ke tiu bildo havas nenion komunan kun la realeco de la ĉina popolo. Ĝi estas simple la esprimo de la roboto, kiu vivas funde de ĉiu el ni en la nekonsciaj tavoloj de nia psiko, kaj kiu elektis objekton, sur kiun projekcii sin.

Vi diros: „Nu, bone, sed kiel tio rilatas al Esperanto?” Per tio, ke la roboto en ni havas difinitajn trajtojn, inter kiuj elstaras rigideco, senkoreco, senemocieco, nevivo, aspekto terura, ega potenco, kaj manko de konsidero al vivantoj. Nu, tiu pure mensa, pure psika figuro, trovas en Esperanto bonegan objekton por projekciiĝi. Kial? Ĉe tiuj, kiuj aŭdis aŭ legis ĝin, pro vortoj kiel „artefariteco” aŭ „planiteco”, kaj ĉe tiuj, kiuj scias nenion pri Esperanto, nur, ke ĝi estas lingvo, kiu ne venas de la prapatroj kun longa historio, pro tio, ke, estiĝinte tiamaniere ĝi povas nur esti malnatura. Lingvo estas asociata en la mensoj al io vivanta. Sed tio validas nur pri normalaj, tradiciaj, malnovaj lingvoj. Lingvo kiel Esperanto ne estiĝis nature, sed ĝi imitas naturajn lingvojn. Ĝi do estas rilate al t.n. naturaj lingvoj, kiel roboto rilate al naturaj homoj.

Multaj ideoj pri Esperanto, ekzemple, ke ĝi estas rigida, ke ĝi ne povas poezii, ke ĝi estas malriĉa, ke ĝi ne povas esprimi sentojn aŭ altnivelajn pensojn, ke ĝi emas blinde surpaŝi ĉion liberan kaj vivan, ke ĝi estas fakte mortiga por konsciaj civilizacioj, ĉio ĉi, kio havas bazon nek en objektiveco, nek en realo, nek eĉ en logiko fontas el tio, ke Esperanto fariĝis por multaj homoj la enkarniĝo de tiu psika nukleo „roboto”.

Mi limigis min ĝis nun al la psikologiaj obstakloj, sed kompreneble estas ankaŭ alispecaj. Ofte ni frontas al kunplekto de sociaj, ekonomiaj kaj politikaj faktoroj. Inter ili, tiu, kiun oni eble plej subtaksas, estas la ega forto de naciismo. En la historio de Esperanto, tiu montriĝis aparte efika por malhelpi la disvastiĝon de la lingvo. Kiam nacio pro historiaj okazaĵoj trovas sin en aparte potenca situacio, ĝia naciismo ĝenerale intensiĝas. Ĝi strebas al kiel eble plej supera pozicio, kaj se ĝi havas tiun, ĝi strebas ĉiakoste konservi ĝin.

Unu el la rimedoj por konservi sian superecon estas agi cele al tio, ke la lingvo de la koncerna nacio estu kiel eble plej uzata en la mondo. Pro tiu politiko, Francio energie agis por malhelpi decidojn favorajn al Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj. Pro ĝi la Brita-Usona Konferenco, kiu kunvenis sub la aŭspicioj de British Council en 1961, difinis por Usono, Britio, Novzelando kaj Aŭstralio politikon, kiu igu la anglan la sola

monda lingvo. Aŭ kiel diris en la revuo *Foreign Policy* David Rothkopf, kiu estas direktoro de Kissinger Enterprises kaj instruas internaciajn aferojn en Columbia University en Novjorko: [mi citas] „Estas en la ekonomia kaj politika intereso de Usono akceli, ke, se la mondo evoluas al la alpreno de unu komuna lingvo, tiu estu la angla; ke se ĝi evoluas direkte al komunaj normoj telekomunikaj, sekurecaj kaj kvalitaj, tiuj normoj estu la usonaj; ke en la maniero, laŭ kiu la homoj estas interligitaj televide, radie kaj muzike, la programoj estu usonaj; kaj ke se komunaj valoroj iĝos ellaboritaj, ili estu valoroj, ĉe kiuj usonanoj sentas sin komfortaj.” [fino de la cito] (David Rothkopf, ‘In Praise of Cultural Imperialism’, *Foreign Policy*, n-ro 107, Summer 1997, pp. 38-53).

Tio estas la politika aspekto de naciismo. Sed kompreneble ĝi interplektiĝas kun ekonomio, ĉar la landoj, kiuj estas politike plej potencaj, estas ankaŭ tiuj, kiuj disponas plej multe da mono. Tial grava ero en la kunteksto, kiu malfavoras Esperanton, estas la sumoj investitaj de la potencaj ŝtatoj por disvastigi la propran lingvon. Francio dediĉas proksimume unu miliardon da eŭroj jare por antaŭenigi la francan lingvon en la mondo [*The Economist* de la 20-a de decembro 2001]. Kaj la germana registaro investas jare 150 milionojn da eŭroj por disvastigi sian lingvon. Ĉinio, Rusio, Arabaj landoj faras same. Kontraŭ tiu aro da riĉegaj konkurantoj, Esperanto estas dekomence en la pozicio de eta David fronte al dika, impona, herkula Goljat.

Mi prezentis al vi nur etan specimenon de la multegaj obstakloj, kiuj malfavoras la disvastigon de Esperanto. La simpla fakto, ke mi parolas ĉi tie Esperanton al diversnacia publiko, kiu komprenas min, estas miraklo, se konsideri la multajn faktorojn, kiuj kunagis, por ke tio iĝu neebla. Nia kunsido estas, inter miliono da aliaj, pruvo pri la nekredebla vivkapablo kaj allogo de la ĝermo, kiun D-ro Esperanto semis en 1887.

Tial mi povas konkludi: Malpravas tiuj, kiuj asertas, ke Esperanto malsukcesis; eĉ pli tiuj, laŭ kiuj ĝi fiaskis. Mi povas resumi mian opinion dirante: Estas multe tro frue por povi juĝi, ĉu Esperanto sukcesis aŭ ne. La sola afero, kiun oni povas honeste diri, estas, ke Esperanto ĝis nun eble ne sukcesis, sed ankaŭ, ke Esperanto ĝis nun ne malsukcesis.

Antologio XXXIX

Bruno Graf

Prezidanto de Svisa Espeanto-Societo

Kiel prezenti esperanton dum la angla regas? (2005)

Prelego en Laŭzano

Enkonduko:

En sia prelego, prezentita dum regiona Eo-renkonto en Laŭzano la 15an de oktobro 2005, Bruno Graf (*1928), prezidanto de Svisa Esperanto-Societo (SES) inter 1997 kaj 2006, okupiĝi pri la demandoj de la Eo-varbado kaj venas al la konkludo, ke la e-istoj ofte malsperte 'vendas' Eon. Pro la diletanteco en merkato ne-esperantistoj ofte ne estas klare informitaj pri Eo.

La dua temo, kiun Graf tuŝas, estas la rilato de la e-istoj al la angla lingvo. Graf restas kun la asertoj, ke malgraŭ la regado de la angla, la lingva situacio por la plimulto de la homaro ne estas kontentiga kaj la totala hegemonio de la angla lingvo minacas la lingvan ekvilibron. Nek la fakuloj, nek la politikistoj kontribuis por plibonigi tiun situacion. Krome Graf estas konvinkita, ke naciaj lingvoj estas principe tro malfacilaj kaj ne taŭgas kiel internaciaj helplingvoj.

Malgraŭ ĉiuj problemoj kaj limoj, kiuj leviĝas por Eo, laŭ Graf por Eo ekzistas multaj bonaj argumentoj kaj Eo donas plurajn konkretajn avantaĝojn. En la Eo-propagando nepre necesus procedi pli sisteme kaj kohera

Originala teksto (en Esperanto):

La demando estas la plej grava por informantoj aŭ varbantoj. Ĝi okupas min de post jaroj. Vi konsentas, ke estas ege malfacile disvastigi esperanton. Denaskuloj estas tro malmultaj. Do ni devas daŭre trovi interesatojn kaj lernantojn, alimaniere la esperanta komunumo formortas. Ni staras antaŭ granda defio.

Kvankam ni estas konvinkitaj esperantistoj, ofte ni procedas kaj argumentas malsperte. Ni estas kaptitaj en Esperantio kaj ne plu vidas la mondon per la okuloj de neesperantistoj. Esperanto estas por ni memkompreneblaĵo, por neesperantistoj estas utopio.

Antaŭ jaroj mi partoprenis seminarion pri publika informado. Ni devis grupe prezenti temon kaj mi proponis paroli pri esperanto. La grupanoj ne sciis, kio estas esperanto. Dum la prezento mi emfazis pri la facileco de la lingvo kaj klarigis la regulan gramatikon, sed baldaŭ la seminarestro interrompis min demandante kial la homoj lernu esperanton. Subite mi komprenis, ke mi malsperte pledis por esperanto.

Germane oni diras metafore: Man muss die Leute dort abholen, wo sie stehen. Esperante: Oni devas alparoli la homojn, kie ili mense staras. Tio estas principo. Do oni ne povas nur paroli pri esperanto, ĉar tio estas nek aktualajo nek interesas. Oni devas komenci per konataj aferoj.

El la merkatico ni scias, ke ni devas sentigi problemon, bezonon aŭ deziron, se ni volas vendi produkton. Tio estas dua principo. Kaj jen kuŝas la dilemo por ni. La homoj ne perceptas lingvan problemon. Ili pensas, ke la angla estas mondlingvo. Kial lerni esperanton, se la angla jam servas kiel helplingvo? Cetere en Svislando ekzistas kvar oficialaj lingvoj, parolataj estas multe pli. Ni al kutimiĝis lerni fremdlingvojn kaj taksas tion tute normala.

Mi rekomendas al informantoj paroli unue pri la tutmondiĝo aŭ globaliĝo. Ĉiuj homoj komprenas tiun esprimon kaj havas spertojn tiurilate. La homoj vizitas ofte fremdajn landojn kaj kontinentojn. La televido raportas senĉese pri okazaĵoj en la mondo. La internacia kunlaboro densiĝas ekonomie kaj politike, sed samtempe kreskas internaciaj problemoj, ankaŭ sentiĝas lingvaj baroj.

Internaciaj organizaĵoj kaj entreprenoj, lingvistoj kaj intelektuloj scipovas interkompreniĝi internacie, sed la granda plimulto de la homoj balbutas fremdajn lingvojn. Mi mem parolas sufiĉe bone la francan, malpli bone la anglan, kvankam mi studis ĝin dum jaroj. La plurlingveco, lanĉita de la Eŭropa Unio, havas limojn, ofte restas teorio. Malmultaj regas plurajn lingvojn. Oni povas paroli pri duklasa socio, unu triono regas plimalpli fremdan lingvon, du trionoj ne povas interkompreniĝi. Ankaŭ traduk-helpiloj kaj plej rafinitaj lerniloj ne sufiĉe helpas. Tio estas vera tutmonda problemo. Mi kuraĝas levi la tezon, *ke naciaj lingvoj estas principe tro malfacilaj kaj ne taŭgas kiel internacia helplingvo.*

Kaj la angla, kiu havas simplan gramatikon? Ĉiu kiu konas la anglan povas konfirmi, ke tiu lingvo estas kompleksa. La skribmaniero kaj la prononco estas tre malfacilaj. Multegaj vortoj havas diversajn signifojn. Spite la angla estas plej uzata, ĉefe en komerco kaj scienco. La kaŭzo ne estas lingva, sed kuŝas en la enorma ekonomia potenco de Usono.

